
ESPERANTO-INFORMILO



Foto: A. Deutsch

Monta pado 'Rothaarsteig' apud la urbeto Dillenburg en centra Hesio

La decembra eldono de la Esperanto-Infomilo aperas provizore redaktita de mi(GH). Mi deziras bonan legadon.

Esperanto-Gesellschaft

Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender: Georg Hennemann

Rehgartenstr. 16

35683 Dillenburg

Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01

BIC: DRESDEFFXXX

bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

Mit DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo kaj politiko
- Eseo
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono

redaktoro: Georg Hennemann

georg.hennemann@t-online.de

korektinto: Ulriko Felmano

Programo

Klub-Abende

Klub-vesperoj

Dienstag, d. 6. Dez. 22

mardon, la 6-an de dec. 22

19:00 h per Zoom

19:00 h per Zoom

Offene Sprachrunde

Malferma babila rondo

Dienstag, d. 13. Dez. 22

mardon, la 13-an de dec. 22

19:00 h per Zoom

19:00 h per Zoom

Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)

Fermita babila rondo (nur klubanoj)

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Donnerstag, d. 15. Dez. 22

jaŭdon, la 6-an de dec. 22

17:30 h

17:30 h

Zamenhoftag

Zamenhoftago (ni parolas pri Zamenhofo, pri sia vivo, deklamas poemojn, lautlegetas iun tekston de li kaj ni prezentas la enhavon de la libroŝrankoj)



luj alportu ŝaumvinon, vasojn kaj kukon!

Dienstag, d. 20. Dez. 22

mardon, la 20-an de dec. 22

19:00 h

19:00 h

Weihnachtsfeier

Kristnask-kunveno (ĉiu pripensu kiel aŭ per kio kontribui kaj ĉiuj kunportu laŭeble ion por manĝi aŭ trinki!)

Naskiĝtagoj

En decembro festos sian naskiĝtagon:

Ekkehard Beyer 7.12

Nobert Pulver 13.12

Ni kore gratulas!

Esperantujo kaj Politiko

Opinio de Georg Hennemann

Ĉiam ekzistas alternativoj. La alternativo al prepari kaj trejni por militi estas prepari kaj trejni por paco, per la lernado kaj daŭra praktikado de neperforta agado kaj teknikoj kontraŭ ĉiuj vivantaj estaĵoj, kaj homaj kaj bestaj. Paca kunvivado ĉiam komenciĝas malgrandskale kaj kun ĉiu homo persone. En la propra familio kaj inter parencoj, per flegado de amikecoj kaj de bona najbareco kaj ne laste ankaŭ per aktiva socia kaj politika partopreno ene de la propra komunumo. Nia bonfartŝtato kun la multaj sociaj avantaĝoj efektive prenas sur sin la plej grandan parton de la respondeco kaj zorgemo, kiu alitempe kaj aliloke estis reguligita ene de la grandfamilio aŭ de la municipo mem.


Hodiaŭ la socia ŝtato ŝajne liberigas la individuon de sia persona respondeco. La ĉiam kreskanta labordividado kaj specialiĝo pliintensigas ĉi tiun tendencon al nepartopreno kaj kreas socion de egoismaj individuoj kaj konsumantoj, kiuj konkuras pri laboro, varoj kaj sociaj avantaĝoj sen atenti tiujn plej proksimajn al ili. Ĉi tio meritokratio kaŭzis senprecedencan socian Malgraŭ proksimiĝanta milito kaj konstantaj malbonaj novaĵoj mi deziras al ĉiuj legantoj

malkonektadon inter la individuoj kaj ĉiu estas alvokita fariĝi pli aktiva en sia propra komuno kaj najbareco. Aplikata al internaciaj rilatoj, bona najbareco signifas, ke la registaro ne unupartie anoncas grandegan monsumon de 200 miliardojn da ŝtata subteno por sia propra loĝantaro, kiel nun okazis, sed kunordigas rimedojn kontraŭ la manko kaj plialtiĝo de prezoj kune kun siaj eŭropaj najbaroj. Evidente, Rusio ne kalkulis je la volo de la ukrainoj rezisti kaj, ĉefe, ne je la unueca agado de la EU-ŝtatoj. Nur kunordigita EU-politiko kaj senlaca solidareco kun migrantoj kaj rifuĝintoj kondukos nin el ĉi tiu krizo al paca kunvivado en Eŭropo. Kiu vidis la bildojn de detruitaj urboj kiel Ĥarkivo, Ĥersono kaj Kijivo, kie homoj nun devas pluvivi sen elektro, hejtado kaj sufiĉa manĝaĵo, nun ankaŭ vidas klare ke la agreso de Rusio celis dekomence ankaŭ al la ukraina civila loĝantaro kaj la krita infrastrukturo. Kiel nun pluevoluas la konflikto ankaŭ dependas de aliaj landoj de eksa Sovetunio kiel Belorusio, sed ankaŭ de Irano kiu vendas armilojn al Rusio.

feliĉan kaj kontemplan adventan sezonon en varma hele lumigita salono. (GH)

Koncerne de neperforta agado kaj teknikoj mi rekomendas la libreton de Aldo Capitini kaj tradukita de Nicolino Rossi. La verko estas mendebla ĉe UEA aŭ ĉe www.retbutiko.de kaj recenzo de Carlo Minnaja troviĝas ĉe

<http://retbutiko.be/de/ero/tnep?lingvo=de&ero=tnep#miaPritakso>



Eseo

Opinia eseo de Fritz-Ferdinand L. Palatinus

Pri justeco

Unua parto: Justeco kaj limigoj

1. Ĉiam kiam la sindikatoj rekomencas siajn bataladojn kontraŭ la dungantoj, la justeco ludas elstaran rolon kiel pravigo de strikoj: justeco pri salajroj, aparte pri la plej malaltaj salajroj, justeco inter la seksoj, sed ankaŭ por pli da rajtoj je kundecido, precipe en la

dungitara politiko. Justeco estas granda vorto dum la laborumaj bataloj, dum la intertraktadoj tamen gravas simple la potenco de la traktantaj partioj.

2. Tio lasta fariĝas precipe klara per la agado de pli malgrandaj sindikatoj, kiuj reprezentas la pli elitarecajn grupojn de profesioj. Dum la rezultojn fintraktitajn de la grandaj sindikatoj la loĝantaro povas senti iel tiel

pravigeblajn, la plej multaj homoj skuas nekrede la kapojn pro la el la dungintoj elpremitaj koncedoj fare ekz. de la sindikatoj de pilotoj aŭ trajnŝoforoj. Ties membroj povus senti la fintraktaĵojn kiel bonmezuraj, la ĝenerala kompreno pri tiuj rezultoj tamen ofte mankas.

3. Eĉ pli mankas tia kompreno, kiam konatiĝas kontraktoj de plejaltaj manaĝeroj kun obscene grandaj salajrosujmoj. Manaĝeroj kredeble difinas justecon por si mem nur en la komparo al siaj kolegoj, atendante ke por samaj sukcesoj ili nepre ricevu samajn kompensaĵojn. Por normalmortontaj homoj, tiuj diskutoj okazas super ĉiuj nuboj.

4. Tute alian percepton pri justeco certe havas senhejmuloj, nenionhavaj maljunuloj kaj malriĉuloj, kaj kronikaj senlaboruloj. Ĉe ili ne temas pri adekvataj enspezoj por bona laboro, ne, ĉe ili temas pri la senĉesaj bataloj por majstri la ĉiutagan vivon. Al tio apartenas en Germanio krom sufiĉa manĝo, loĝejo, kuraca provizado ktp. ankaŭ la kvereloj kun la superbordanta burokratio. Ĝuste en la socialkriza tereno multaj homoj ne kapablas mastrumi tion sen kompetenta ekstera helpo. Kelkaj eĉ ne kapablas serĉi tian helpon. En tiu medio la nocioj de la sindikatoj rilate al justeco ofte ŝajnas luksaj problemoj.

5. Se ni direktas nian rigardon nun al la terglobo tuta, la justeco komenciĝas jam simple per resti viva. Per la demando, kiel ne morti pro malsato, pro malsanoj, pro frostiĝo, per la demando kien fuĝi por trovi iometan pacon. Jen ni atingis la minimuman bazon de justeco: travivi sen timo pri morto.

6. Justeco do estas komplika nocio. Traktataj senjuste (kaj sekve rajtaj je batali por rilata egaligo) sin sentas la homoj kvazaŭ ĉiam en la komparo al homoj, kies cirkonstancoj estas multe pli bonaj ol la propraj. Sed en komparo kun homoj, kiuj statas multe pli

malbonaj ol oni mem, sentas siajn avantaĝojn maljustaj nur la plej malmultaj homoj.

7. El tiu tre homeca sinteno sekvas konduto, kiun mi emas nomi „gerrymandering“ (manipuladon) de la justeco. Tio signifas, ke oni desegnas limojn ĉirkaŭ certaj persongrupegoj tiel, ke ene de tiuj limoj oni kun la plej pura konscio povas senti sin traktata maljuste, kaj batali kontraŭ tiu traktado. Ekzemplo por tio estas komuna limo ĉirkaŭ ĉiuj dungantoj kaj dungitoj de germana industria branĉo. Se tia limo ne ekzistus, oni devus striki por justeco priorene ne pri pli altaj salajroj aŭ laborejaj cirkonstancoj, sed priorene ja kontraŭ la malsato kaj la mizero en la mondo.

Dua parto: Homoj ne estas dioj

8. La diskuto ĝis nun tamen neglektas gravan faktan: Homoj estas nek ĉionsciaj nek ĉionpovaj.

Aparte dum la juneco, kiam la spirito kaj menso de la homo pli etendigas rian etikan rigardon, kaj la kondiĉoj en tuta la mondo aperas sur la interna ekrano, ri en la plejo de la kazoj emas iumaniere ribeli kontraŭ la maljustecoj en la mondo kaj evoluigas simplan kaj klaran bildon pri tio, kion devu entrepreni ĉiu homo por fini tiujn. (Mi ŝatas citi ĉiloke pikan frazon de Henry Louis Mencken: "Por ĉiu kompleksa problemo ekzistas solvo, kiu estas simpla, klara kaj malĝusta").

Sed tiu imago neglektas, ke homo estas limigita en preskaŭ ĉiu dimensio de sia esto. Necesas apliki justecon ankaŭ al la homa naturo. Se ili estus ĉionpovaj dioj, ili povus ami ĉiun homon de la tuta mondo el plena koro, povus mildigi la sortojn de ĉiu unuopa homo, kaj povus preventi ĉiun maljustecon.

Sed tio estus superhoma. Tio superas la limojn kaj animajn kapablojn de la homo.

Familipatron kaj -patrinon, kiuj pagas ĉiun monate por finaĉeti sian domon kaj volas sekurigi al siaj infanoj bonan ekon en ties futuron kaj samtempe celas ebligi la plej bonan vivon por la familio, oni ne povas fortenti de batali por sufiĉa salajro. Homojn, kiuj vidas, kiel entrepreno helpe de ilia laboro produktas bonegajn gajnojn, oni ne povas fortenti de postuli de tiu gajno bonan parton, kiun ili taksas prava. Eĉ homoj, kiuj komprenas sin bonaj kaj etike gvidataj, havas prioritatojn por homoj, kiuj estas proksimaj al ili kaj kiujn ili amas kaj volas nur la plej bonan por ili, kaj la prioritatojn por foraj homoj en bezonumo kaj mizero ne ludas superan rolon.

9. Homoj estas homecaj. Do oni mezuru ilin ne laŭ perfekta, tamen nur teoria idealo, sed laŭ iliaj ecoj kaj (ne)povoj. Eble ili kaj la siaj ne kapablas trovi sian plenumon kaj feliĉon en memoferti sin kaj ĉion, kion ili posedas, ĝis la pleja asketeco por savi la plej multajn mizerulojn en la mondo, sed tio estas nek hontindaĵo nek krimo.

Oni estu indulga al ili kaj centprocente agnosku, se ili helpas senkompense siajn familianojn, najbarojn kaj amikojn, se necese (eĉ se ne ĝis plen memoferto). Oni agnosku, kiel ŝoforo helpas al viktimo de trafikakcidento, kiel la honoroficaj fajrobrigadoj protektas la vivojn kaj havaĵojn okaza de dombrulegoj. Oni altestimi la

agadon de multaj asocioj kaj iniciatoj, kiuj celas plibonigi specifajn miskondiĉojn en apartaj kampoj. Oni mezuru la homojn laŭ iliaj kapabloj ne laŭ la kapabloj de dioj.

10. Se oni pripensas ĉion ĝis nun diritan, oni komprenas, ke justeco estas tre granda vorto, eble pro homoj tro granda vorto, se oni komprenas ĝin kiel senlima justeco. Oni do konservu grandan respekton al justeco kaj sin konfrontu al ĝi kun adekvata humileco.

Kompleta justeco sekve estas teoria idealo, kiu praktike ne estas atingebla. Aliflanke ne estas opcio fari nenion. Amartya Sen rimarkas en iu frazo de sia libro "La ideo de justeco" la ideon, ke ne tre taŭgas engaĝiĝi por "justa socio", sed oni agadu pragmate por "PLI justa socio", ĉiu laŭ sia povo.

Tiuj ekkono kaj ideo ŝajnas al mi tre taŭga kiel resumo de mia eseeto. Estu tiel. (TF)

Aldono: Rekomendo de libroj

"Die Idee der Gerechtigkeit" (La ideo de justeco) el 2017 verkita de Amartya Sen, kiu ricevis en 2020 la pacopremion de la germana librokerco. Legebla, sed sufiĉe altnivela.

"Toleranz – was müssen wir aushalten?" (Toleremo – kion ni devas elteni), Domink Balg el 2021. Libro pri la diferenco inter tolerenda kaj ne plu tolerebla. Bone legebla.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

- Ĉu vi stiris la aŭton en la garaĝon?
- Ne komplete, sed ĝiajn plej gravajn partojn.

Proverbo de la monato

La zamenhofa proverbo, kiun mi tiun monaton prezentas estas: ‚Iri for en bona hor‘.

Ankaŭ la senco de tiu proverbo estas memevidenta kaj indikas ke amikoj aŭ malamikoj pli bone devus adiaŭi kaj forlasi la gastiganton, antaŭ tiu pro io ĉagreniĝas.

Enigmo (sendita de Ulriko):

La sekvaj asertoj estas malĝustaj, aŭ tute klare, aŭ iasence. Ĉu vi scias kial, do, ĉu vi scias poe kiel estas "vere"?

- (1) Dio kreis ĉion dum ses tagoj.
 - (2) Gutenberg inventis la libropresadon.
 - (3) Ĉokolado, kafo, maizo, terpomoj kaj tomatoj venis el Ameriko.
 - (4) Ĝejmz Ŭot inventis la vapormaŝinon.
 - (5) Usono estis la unua demokratio.
 - (6) Homoj devenas de simioj.
 - (7) Karl Benz inventis la aŭtomobilon.
 - (8) Fungoj estas plantoj.
 - (9) Albert Ejnŝtajn inventis la relativteorion.
 - (10) La Papo subtenis la kandidatiĝon de Donald Trumpo.
 - (11) Trinki desinfekciaĵon helpas kontraŭ virusa infekto.
 - (12) Angela Merkel estas la filino de Adolf Hitler.
 - (13) La Kronviruso estas invento de konspiruloj por vakcine enĉipigi kaj tiel sklavigi la homaron.
 - (14) Putin subtenas Ukrainion por kontraŭbatali ties faŝisman registaron.
 - (15) Sunenergio estas renovigebla energio. Ĉiuj homoj estas egalaj.
- Ĉu vi eltrovis, kiuj asertoj kial estas malĝustaj? (Solvej sekvos en la venonta ei.)

(La solvo de la antaŭa enigmo estis: *“La plej bona tajlorejo de tiu ĉi strato.”*)

Dediĉe al Zamenhoftago

de Ulriko Felmano

Dialogo, ie en la galaksio:

Mutvurko: "Ĉefo, mi devas informi, ke vizito al Tero problemos!"

Graklo: "Ĉu vi ne sendis Zamenhof?"

Mutvurko: "Ni sendis. Sed la teruloj obstinis. Francujo, Germanujo, Usono kaj Sovjetunio sinsekve dum cent Tero-jaroj baris aŭ malpermesis la lingvon!"

Graklo: "Nekredeble! Ĉu ili inventis alian nenacian regulan lingvon?"

Mutvurko: "Jes. Multajn."

Graklo: "Kiom da?"

Mutvurko: "Ĉirkaŭ... du mil."

Graklo: "KLF? Du mil? Kaj kiun lingvon ili adaptis grandskale?"

Mutvurko: "Nu...neniun de tiuj."

Graklo: "Neniun? Ili kreas dumil artajn lingvojn por solvi la problemon... kaj poste ne uzas eĉ unu?"

Mutvurko: "Ĝuste."

Graklo: "Do, kreive Brobdingnago, racie Liliputo... kiel ili do interkomunikas?"

Mutvurko: "Per la multregulaj esceptoplenaj polisemiaj naciaj lingvoj. Ĉiuj 200 jaroj estas alia plej ofte uzata..."

Graklo: "Kiu nun?"

Mutvurko: "La plej ofta estas aktuale la angla. Sed kreskas la uzo de la hispana kaj ĉina. Kaj regione oftas ankoraŭ la franca, la turka, la araba, la rusa, la svahila..."

Graklo: "Sufiĉas! Ni do por kontaktigi denove bezonos la helpon de la TGIDĤL, la Tut-Galaksia Instituto por la Deĉifrado de Ĥaosaj Lingvoj, ĉar maŝintradukado tiuokaze ne sufiĉos por precize komuniki."

Mutvurko: "Jes. Kiom tio denove kostos!"

Graklo: "Estas ruiniga. Eble ni atendu pliajn 100 jarojn. Eble ili tiam parolos racian lingvon..."

Mutvurko: "Espereble almenaŭ elektos la indonezian anstataŭ la anglan."

Graklo: "Kiu scias, eble ili tiam uzos eĉ pli probleman lingvon. La ĉinan ekzemple..."

Mutvurko: "Oni devus rajti puni tiujn obstinulojn per hipnot-radia enkonduko de la plej komplika lingvo de la galaksio."

Graklo: "Jes! Iĥkuil!"

Mutvurko: "Mi pensis pri la antikva latina!"

Graklo: "Ho ve! Tio estus tro kruela!"

(Ambaŭ ekas ridegi Homerece)

